# Novjorka Prismo

Numero 136 Septembro 2004


*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia septembra kunveno.*

DATO: Vendredon, la 17-an de septembro 2004, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second floor, Room A, NYC
(between Bowling Green and Exchange Place)


PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – **Esperantaj eventoj kiujn, ni ĉeestis dum la somero.**

– **Interreta diskuto: kiom da subteno/rekono nia klubo donu al la interretaj servoj "Meet-Up" kaj "Yahoo! mailing list"?** ★


## Nia somera pikniko en Bryant Park

Sabaton, la 19-an de junio, 12 personoj piknikis en Bryant Park, malantaŭ la ĉefa biblioteko de Novjorko. Estis bela, sunbrila tago, kaj ni sids ĉe tabloj kun ombreloj apud la statuo de William Cullen Bryant (1794-1878). Bryant estis usona advokato kaj poeto, kaj dum preskaŭ 50 jaroj li estis la ĉef-redaktoro de la ĵurnalo *New York Evening Post*. Li estis forta subtenanto de homaj rajtoj.












La piknikantoj manĝis kaj babilis pri someraj planoj. La tuta parko estas senpaga WiFi 'hot spot' por komputiloj, kaj ni sukcesis atingi la Interreton per laptop-komputilo, sen kablo, de la mezo de la parko. Rebecca kaj Emily Medrano alportis salto-ŝnuron kaj preskaŭ ĉiu alia piknikanto provis saltadi la ŝnuron, eĉ Rochelle Grossman, Cécile Low, kaj mi.




Hazarde, tiun tagon, la vojo de la Olimpika Torĉo preterpasis Bryant Park, ĉe 42-a Strato kaj 6-a Avenuo, survoje ĉirkaŭ la mondo al Ateno por la Olimpikaj Ludoj. Do, je la kvara horo ptm, ni finis la piknikon kaj promenis kaj



staris apud 42-a Strato por vidi la Torĉon kaj entuziasmigi la torĉkurantojn. Membroj de la olimpika karavano disdonis al ni trinkaĵojn, balonojn, kaj ruĝajn olimpikajn flagrubandojn en pluraj lingvoj. ★

– *Jim MEDRANO*

# Someraj renkontiĝoj



## IBM Plaza

Ses personoj ĉeestis IBM Plaza la 4-an de julio. Inter ili estis Nijl BLONSTEIN, kiu baldaŭ translokiĝos aŭ al Florido aŭ al Brazilo. Li donis al unu aŭ du ĉeestantoj fotografojn por disdoni al aliaj membroj, kiuj ne ĉeestis. Nijl estas longtempa membro de nia Societo. Ni esprimis la esperon, ke Nijl havu bonan ŝancon dum la venonta jaro. Aliaj personoj, kiuj ofte ĉeestas, estis for. ★

*– Stuart GREEN*

## Kajo #25

La 16-an de julio kvar klubanoj iris al Kajo #25 por vidi la filmon "Chitty Chitty Bang Bang." Kiel kutime, ni ĝuis la sanpagan krevmaizon, sed ne tiel kutime, duono de la grupo foriris frue. Finfine komencis pluvi, kaj ni ĉiuj hejmeniris. Oni povas prognozi nek la veteron, nek la kvaliton de filmo, ĉu ne? ★

*– Thomas ECCARDT*

## Noguĉi ĝardeno

La 1-an de aŭgusto ses novjorkaj geesperantistoj vizitis la muzeon en Queens, kiu montras la skulptaĵojn de Noguĉi, duon-japana kaj duon-usona artisto. Ni renkontiĝis en la bela ekstera ĝardeno, kaj esploris la internon, inkluzive la malluman superan etaĝon. Poste, ni vizitis la najbaran Socrates Sculpture Park. ★

*– Thomas ECCARDT*

## Restoracio Esperanto

La 20-an de aŭgusto, ses ESNY-anoj manĝis ĉe la restoracio Esperanto ĉe la Avenuo C kaj la 9-a Strato en la Orienta Vilaĝo. La manĝaĵo estis bongusta kaj la konversacio estis interesa. ★

*– Thomas ECCARDT*

## Stuyvesant Town Oval

Dimanĉon, la 5-an de septembro, 14 personoj renkontiĝis por somerfina pikniko ĉe la "Oval" en la mezo de Stuyvesant Town. Ni kunmetis tri lit-tukojn kaj sidis sur la herbaro. Oni manĝis sandviĉojn, vinberojn, karotjn, ktp. kaj babilis interalie pri someraj spertoj, mondaj eventoj, lingvoj, kaj komputiloj. ★

*– Jim MEDRANO*

## Kafejo Esperanto



*Acuŝi Niŝinaga*

La 11-an de septembro, kvar membroj de nia klubo renkontiĝis kaj vepermanĝetis kun sr-o Acuŝi NIŜINAGA, unu el du Oomotanoj el Japanio, kiuj vizitas Novjorkon. Sr-o Niŝinaga estas la TTT-estro de ties retpaĝo. Ni parolis pri multaj aferoj, inkluzive Jeroŝenkon, rusa poeto kiu verkis en la japana. ★

*– Thomas ECCARDT*



*Wendy, Arnold, Pam, Susan, Tom, Jeff, Alex, Jim, Nancee, Emily kaj ŝia amiko James ĉe la 'Oval' de Stuyvesant Town.*




# 11-a Internacia Semajnfino Esperantista en *Okemo Mountain Resort*, Ludlow, Vermonto, Usono

**De la 9-a ĝis la 11-a de oktobro 2004 (Dank-Festo en Kanado, Kolumbo-Festo en Usono)**

(Informo de la Esperanto-Societo Kebekia – *http:// www3.sympatico.ca/esperanto/*)

Okazos denove aŭtuna renkontiĝo en Okemo, Vermonto. Dum la pasintaj jaroj, tiuj kiuj venis vere ĝuis la belegan montar-gastejon, la amikecan etoson, la internaciecon de la ĉeestantaro kaj la varian programon.

## Kio estas I.S.E.?

La Internacia Semajnfino Esperantista celas kunigi esperantistojn el nordorienta Ameriko dum tritaga semajnfino. Organizas ĝin la Esperanto-Societo Kebekia lige kun aliaj esperantistaj asocioj kaj kluboj en Usono.

## Programo de I.S.E.

- Komenciĝo je la 14a horo sabate, la 9-an de oktobro.
- Finiĝo je la tagmezo lunde, la 11-an de oktobro.

La programo estas plurnivela, kursoj por komencantoj kaj progresantoj kaj diversaj prelegoj por la lertuloj. Vi povas ekskursi en la naturo aŭ al apuda urbeto Ludlow. Sabaton okazas la amuza interkona vespero kaj dimanĉon festa komuna vespermanĝo. (Ĉiuj kunportas ion por dividi kun aliaj). Sekvas kultura vespero kaj vi estas bonvena prezenti ion.

Se vi intencas partopreni la kursojn aŭ prezenti ion dum la semajnfino, bonvolu informi nin, unu monaton antaŭe tiel ke ni povu akurate finplani la programon.

## Kiu venas?

Dum la pasintaj I.S.E., 40 ĝis 80 esperantistoj ĉefe el Ontario, Kebekio, Nov-Anglio, Nov-Jorkio, sed ankaŭ el Britio, Germanio, Svisio, kaj eĉ el Japanio partoprenis entuziasme. La plej juna aĝis 2 kaj la plej aĝa 80!

Invitu viajn familianojn kaj konatulojn ĉar la gastejo situas en tre bela montara regiono kie ili povos ripozi dum vi esperantumos. Venu ĝui internacian amikan etoson. Bonvenon en Esperantio!

## Loĝado por I.S.E.

NB: Ĉiuj prezoj indikitaj estas en usonaj dolaroj

Vi havas du alternativojn por loĝado: loĝi aŭ ĉe Okemo Mountain Resort, kie okazas I.S.E., aŭ en apuda Ludlow.

### LOĜI ĈE OKEMO

Okemo estas belega skiferiejo. Ĉiu apartamento ĉe Okemo havas plenekipitan kuirejon (vi devas alporti nur manĝaĵon). La apartamentoj ĉe Kettle Brook kaj Winterplace/ Ledgewood ankaŭ havas manĝejojn kaj salonojn kun kamenoj (kun brulligno) kaj televidiloj (kun vidbend-aparatoj). Se vi preferas loĝi ĉi tie, vi povas fari viajn aranĝojn rekte kun Okemo, aŭ vi povas kontakti nin pri gruparanĝoj.

## Kiel mendi?

Vi povas kontakti la feriejon (angla-lingve) por scii la prezojn por apartamentoj ĉe Okemo kaj ricevi informilon.

- telefone: 1-800-78-OKEMO
- retpoŝte: okemo@ludl.tds.net
- sur la TTT: *http://www.okemo.com/survey.html* (formular-kongrua TTT-legilo bezonata)

## Gruparanĝoj

Se vi ŝatus dividi apartamenton kun aliaj esperantistoj, vi devas mendi lokon antaŭ la 7a de septembro.

**Normand Fleury** (Esperante, france, angle) retpoŝto: esperanto@sympatico.ca

### LOĜI EN LUDLOW

Vi havas tri elektojn:

1. Loĝi en junulargastejo: The Trojan Horse, 15$US nokte, 802-228-5244 THLODGE@aol.com
2. Loĝi en motelo/hotelo: estas dekoj de gastejoj en Ludlow. La plej malmultekosta, kiun ni povis trovi kostas ĉirkaŭ 60$US nokte.
   Jen parta listo:
   Timber Inn Motel, 802-228-8666
   Inn Towne Motel, 800-228-8188
   Cavendish Point Hotel, 800-438-7908
   Happy Trails Motel, 802-228-8888
   Plia listo haveblas . . .
3. Aliaj luservoj:
   - Okemo Valley Hospitality Association
   - Ludlow Chamber of Commerce, P.O. Box 333, Ludlow, VT 05149, US
   - Strictly Rentals, 800-776-5149

## Kotizoj

Ordinara: **25$US**

Rabatita: studentoj, senlaboruloj, emeritoj: **10$US**

La kotizo estas pagebla surloke je via alveno, tamen ne forgesu aliĝi tuj!

## Kiel atingi Okemon?

### PER AŬTO

Alklaku tien ĉi por mapo kaj direktoj (en la angla). Kiam vi atingos Luldow, petu la vojon por atingi "Okemo Mountain Resort".

### PER AVIADILO

La plej bona flughaveno estas verŝajne Bradley International Airport en Hartford (Connecticut).

Tie, lueblas aŭtomobilo, kaj oni povas veturi rekte norden laŭ granda ŝoseo al Ludlow. La vojaĝo inter Hartford kaj Ludlow estas proksimume 2,5 horoj.

Ekzistas flughavenoj ankaŭ en Burlington, Vermonto (tiu estas malgranda kaj malpli oportuna) kaj Albany, Nov-Jorkio. El tiu lasta flughaveno oni bezonas nur iom pli ol du horoj por iri al Okemo.

Por pli da informoj pri aviadila alveno, bonvolu kontakti Vilĉjo Harris

## Kiel aliĝi?

Se via TTT-legilo ne formular-kongruas, b.v. alklaki tien-ĉi por sendi la detalojn retpoŝte.

Via kompleta nomo: ________________

Nomo(j) de kunaliĝanto(j) (indiku ankaŭ se venos bebo aŭ infano):
________________
________________
________________

Via paper-poŝta adreso:

Adreso: ________________

Urbo: ________________

Ŝtato aŭ provinco: ________________

Lando: ________________

Via telefon-numero (ne forgesu la regionan kodon): ________________

Via retpoŝta adreso: ________________

Mia lingva nivelo estas _baza _meza _alta

Ĉu vi kontribuos al la programo? _Jes _Ne

Mi havas aŭton kaj mi pretas veturigi iun el mia (urbo/regiono) __Jes __Ne

Ĉu jes? Bonege! Kiel? ________________

Ĉu vi jam ĉe estis antaŭajn I.S.E. en Okemo? __Jes __Ne

Aliĝo je ordinara kotizo: __Jes __Ne

Aliĝo je rabatita kotizo: __Jes __Ne

Ne necesas sendi la kotizon antaŭe sed necesas ALIĜI FRUE.

Ni akceptas ankoraŭ poŝtajn aliĝojn je:

ESK-OKEMO
6358-A, rue de Bordeaŭ
Montréal, Québec
Canada, H2G 2R8 ★

# Anoncoj

## Laste vizitis

Dum junio restis ĉe ni Roberto Perez-Fraco, el Panamo, kiu ĵus ricevis sian magistran diplomon pri loĝistiko de MIT. Li vizitis Novjorkon kun sia edzino por ĝustigi sian vizon kaj por viziti niajn muzeojn. Dum la vizito, la paro akompanis nin dum posttagmezo en Centra Parko kie, kun niaj infanoj, ni manĝigis anasojn kaj ĝuis la naturon. Roberto havas propran, tre interesan retpaĝon ĉe: http://rp-f.com/esperanto.php. ★

– *Jim MEDRANO*



*Roberto kaj lia edzino en Novjorka taksio dum junio.*

## Piknika foto



*Tom, Stuart, Nijl, Jeff, Maki, Jim, Nancee, Rebecca, Emily, and Rochelle antaŭ la statuo de William Cullen Bryant dum la somera pikniko.*

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Septembro 17**

ESNY KUNVENO
**Raportoj pri la someraj eventoj.**
**Interreta diskuto.**
*Vendredon, 6:30 ptm at UFT*

**Oktobro 3**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 137)

**15**

ESNY KUNVENO
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**United Federation of Teachers** (UFT)
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

**"IBM" Building Atrium** (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

## Letero al *Prismo*

Karaj amikoj de Usono, hodiaŭ mi legis viajn paĝojn de NY kaj mi estis tre impresata. Mi estas instruisto de angla lingvo en gimnazjo – infanoj de 15 ĝis 19, kaj mi tre ŝatas anglan kaj usonan literaturon. Mi havas 45 jarojn kaj mi ne-niam estis en Ameriko.

Mi havas oferton por vi kaj aliaj samcivitanoj, ke mi alvenu al vi kaj prelegu pri nia loka kulturo – Silesia regiono – aŭ pri pedagogio ankaŭ angle, mi povas sendi al vi ekzemplan artikolon en la angla por helpi decidi. Mi loĝas en Eŭropo en Ĉeĥa Respubliko. Mi estas serioza persono, kaj tre sopiras pri usonaj kontaktoj. ★

– *Amike Henrik Rozanski*
*<AGabinet@seznam.cz>*


ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Korespondа Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Thomas Leong (718) 981-4252
**Kasistino** Sofiya Soskina (914) 813-2495
**Program-Direktoro** Neil Blonstein (212) 663-2020

**Novjorka Prismo**
Numero 136 – Septembro 2004
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2004 Esperanto Society of New York